

## Leterkesto VI.

Radioprelego de Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI, SRI 1990-005-A-1, 1990.02.17

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia vi aŭdas Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI, kiuj prezentos al vi la sesan parton de nia leterkesto. Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj sendas al ni leterojn kun komentoj, instigoj kaj novaj ideoj. Ni scias, ke niaj elsendoj estas tre popularaj, kaj ankaŭ niaflanke ne mankos novaj ideoj por daŭre povi oferti al vi ion aktualan en esperanto.

A.- Ni profitas de la okazo saluti profesoron Godwin I OBOH, kiu estas la prezidanto de Niĝeria Esperanto-Asocio

Cl.- Espereble oni aŭdas nin nun ankaŭ en Bergen, Norvegio. Ĉar sinjoro Agnar FITJAR skribis al ni, ke en tiu urbo niaj radioprogramoj estas tre bone aŭdeblaj. Sinjoro Kjell Beden HOFF salutis nin el Norvegio okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Eĉ de la pli norda norvega urbo Tromsø skribis Claude ROUGET, kiu estas franco, studanta en Norvegio.

A.- Multaj geaŭdantoj skribis al ni el Pollando. Inter ili estas sinjoro Marek BAMBERKSI, kiu interesiĝas pri artefaritaj lingvoj kaj scias, ke en Svislando tiuj lingvoj ĉiam havis multajn adeptojn. Kiel klubgvidanto Antoni BEYGA deziras utiligi niajn eldonaĵojn dum la agado kun la gelernantoj kaj klubanoj. El la pola urbo Vroclavo skribis al ni sinjoro Zdisław ROGALSKI. Li rakontis pri sia vojaĝo tra Aŭstrio, Jugoslavio, Bulgario kaj Turkio. Li volis atingi Teheranon, sed mankis tempo por atendi la iran vizon kaj bedaŭrinde li devis ĉesigi la vojaĝon. Bedaŭrinde sinjoro ROGALSKI devis vendi sian radioaparaton, ĉar li bezonis monon. Alia aŭdantino estas sinjorino Mirosława CIESIELSKA el la urbo Gdansk. Ŝi havas 27 jarojn kaj laboras en pedagogia biblioteko interesiĝante pri historio pri la libro. Ŝi okupiĝas ankaŭ pri arto kaj kreas gobelinojn. Sinjoro Jerzy DRYJA estas 39-jara turistoficisto, loĝas apud Varsovio kaj sekvas nian programon ekde la jaro 1987. Sinjoron Torvid EDVARSEN, la norvegan esperantiston loĝantan en Pollando mi persone renkontis antaŭnelonge en Moskvo. Sinjoro Stanisław STAŜEVSKI interesiĝas pri demandoj de la vivo ĝenerale, de politiko, kulturo, scienco, tekniko kaj katolika religio. Li ofte pensas pri la eŭropa kuniĝo malgraŭ la politikaj diferencoj. Ŝajnas al sinjoro STAŜEVSKI, ke la diferencojn oni devas elimini, por ke la nacioj en Eŭropo proksimiĝu. Kaj ankaŭ sinjorino Zaja KAZIMIERZ volas aŭdi niajn elsendojn, ĉar ŝi volas pli multe ekscii pri la vivo en aliaj landoj.

Cl.- Reagan leteron ni ricevis de sinjoro Juakim LAGARTIŜA el Portugalio. Li denove klare kaptis la elsendon, kiu temis pri la nuancoj de la pronomoj **li**, **ŝi** kaj **ĝi** kaj la finaĵoj de la verboj. Sinjoro LOGARTIŜA estas kontraŭvole izolita esperantisto, kaj en la lernado li foje stumblas. Sed li ankoraŭ ne sukcesis bone kompreni, kiam oni devas uzi la vorton ties anstataŭ ĝia, lia aŭ ŝia. Mi povas al vi klarigi, ke ties rilatas al la ĵus antaŭa substantivo subjekta aŭ nesubjekta, dum ĝia, lia, ŝia ĝenerale rilatas al iu ajn antaŭa substantivo. Ni havas ankoraŭ la pronomon sia, kiu rekte kaj nepre rilatas al la subjekto.

A.- El Sovetunio atingis nin korespondaĵoj ĉefe el Latvio de sinjorinoj Mirdza BURGMEISTER kaj Saulcerite NEILANDE, kiuj loĝas en la urbo Riga. Kelkfoje sinjorino NEILANDE ekscias ion pri Svislando surbaze de filmoj prezentitaj en Sovetunio. La svisa popola muziko plaĉas evidente ne nur al sinjoro Ihor DRUL, nia aŭskultanto en la urbo Luck en la volhina regiono de Ukrainio. Li skribis, ke kiam la muziko eksonas, tiam lia papageto ekpepas laŭ la muziktakto.

Cl.- En la sudafrika Kaburbo estis fondita en 1987 studenta klubo, kiu planis ekspozicion por tiu ĉi jaro por montri al la studentoj de la kaburba universitato, ke esperanto ekzistas kaj estas parolata en la tuta mondo. Nia radiostacio sendis prospektojn, kaj ni esperas, ke ili bonorde alvenis en Sudafriko. Do, ni ŝatus ekscii, ĉu la ekspozicio realiĝis kaj ĉu la klubo pligrandiĝis.

A.- Sinjoro Lennart ÅBERG en Gotenburgo, Svedio, malofte skribas, sed despli multe aŭskultas. Li konsolis nin, ke ankaŭ en Svedio ina ministro devis demisii dank'al strangaj manipuloj en nelegalaj aferoj, simile al la kazo de la svisa ministrino Elisabeth Kopp. Okaze de la tria datreveno de la murdo de Olof Palme, sinjoro ÅBERG kaj ties edzino ĉeestis rememoran kunsidon en Gotenburgo. Kaj alia aŭdanto el Svedio, sinjoro BERNHARD, sekvas ne nur nian radioprogramon, sed ankaŭ la esperanto-elsendojn de Vieno kaj Pekino. Sinjoro BERNHARD iom sentigis al ni la someron en Sudsvedio, inter alie komunikante, ke la novaj terpomoj ĉisomere bone prosperis kaj ke estis aparta ĝuo manĝi ilin kune kun freŝaj haringoj. Per radio eblas lerni bonan lingvouzon. Tiel opinias sinjorino Ingrid JOHANSSON el Norrköping. Laŭ ŝiaj oreloj la sufikso -ujo post gentaj nomoj ekzemple en landaj nomoj estas malbela kaj preskaŭ ridinda. Imagu iun ujon entenantan svedojn aŭ germanojn, esprimiĝas sinjorino JOHANSSON. Niaj disaŭdigoj fariĝas parto de la ĉiutaga vivo de gesinjoroj NISSASTIGEN en Svedio. Kiam ili vojaĝas, ekzemple al la SAT-kongreso en Germanio, ili ĉiam kunportas la radioaparaton por ne maltrafi siajn elsendojn. Ekde du jaroj, la esperantistoj en Malmö havas la eblon disaŭdigo en esperanto kaj en la sveda tra la kanalo de Radio Malmö. Tion komunikis al ni sinjoro Erik SWÄRD.

Cl.- Ni ŝatus kore saluti ankaŭ la svisajn geaŭskultantojn. Ili estas sinjorinoj Sonja BRUN en Rotkreuz, Jeanette FERRARI en Fribourg, Gertrud EGGENBERGER en Winterthur kaj Elisabeth VIRET en Onex-Ĝenevo. Krome funkciigis la radion hejme ankaŭ sinjoroj Rolf ERNST en Frauenfeld, Egon RUSA en Tann, Jean RUFER en Berno, Werner SCHAUFELBERGER en Zünch kaj Alexander THALER en Ebnet-Kappel.

Fine ni menciu, ke ni havas ankoraŭ radio-amikojn en Tanzanio kaj Usono.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia en esperanto. Parolis Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI. Ĝis reaŭdo!